Bolanta Kaldrono

INFORMILO *274 de la*
Esperanto - Grupo Bremen
Marto - Majo 2005

Sekr: D-ro Hans Walter Krüger, Dordrechter Str 36, 28259 Bremen, Tel: 0421 561943
Informoj: Prezidanto OstR Hellmut Grebe, Tel: 0421 3963480
Kasistino: Ruth Bohn, Tel: 0421 382715
Red: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen, Tel: 8476806

Vizitu nin en Interreto: **www.esperanto.de/bremen**
Dort präsentieren wir unser aktuelles Programm und unsere Zeitung Informilo



Printempas
espereble ankaŭ por Esperanto.

Gratulon pri la modela agado de la
Interkultura Centro Herzberg.

Nia Programo

La 09an de marto Lumbildprelego (Hellmut Grebe)
Vojaĝo tra Portugalio

La 13an de aprilo Prepara diskuto pri nia 100-jara jubileo

La 18an de majo Prelego

La 11an de junio Maja ekskurso
Planita: al olemuelejo proksime de Oldenburg.
Kune kun niaj nederlandaj kaj EGU geamikoj.

La 06an de julio Ĝardenfesto
Invitas s-ino Ruth Bohn

En aŭgusto Ni feriu

La 07an de septembro Postferia kunveno
Ĉiu raportu pri siaj travivaĵoj

La 12an de oktobro Diskuto pri aktualaĵoj Hans-Walter Krüger:
„Ĉu evolua stagnado signifas malprogreso?"

La 09an de novembro Lingvaj studaĵoj
Aranĝos Kurt,. Hellmut kaj Franz

La 07an de decembro Zamenhoffesto
Ĉijare ĉe familio Hartig

2006
Januaro, la 11an Ni bonvenigu la novan jaron

Februaro, la 08an Jarkunveno

Tamburi por nia 100-jara jubileo en 2006

Planita en la tuta jaro 2006:
Publikaj informvesperoj en la Stadtwaage.
Profundaj esploroj en nia arkivo.
Ekspozicioj en publikaj oficejoj aŭ lokoj.
Artikoloj en bremenaj ĵurnaloj.
Gastoj (eksterlandaj) kunagu en niaj prezentaĵoj.
Raportoj pri la evoluo de niaj klopodoj aperos en niaj sekvontaj Informiloj.

Retrospegulo

Zamenhoffesto en Lemwerder la 8-an de decembro

Familio Kruse afable invitis nin festi la tradician Zamenhoffeston kaj preskaŭ ĉiuj gemembroj venis.. Ĉijare la vojaĝo al Lemwerder apud la Weserrivero estis riska afero, ĉar densa nebulo kovris la tutan regionon. Foje ni pene klopodis veturi per la aŭto sur la ĝusta stratflanko kaj eĉ ne deruliĝi la straton.Tial ni miris, ke tiom da membroj venis.

Elisabeth tre afable bonvenigis nin, Franz ankoraŭ ne hejmenvenis de sia laboro. Ĝis ĉiuj alvenis, ni aranĝis nin komforte en la bele aranĝita salono. Vigla babilado plenigis la ejon. El Oldenburg venis Elfriede Coburger kaj baldaŭ alvenis ankaŭ ĉiuj anoncitoj.

Elisabeth invitis nin al feste aranĝita tablo plena da diversaj teoj, kuketoj kaj aliaj frandaĵoj. Ni admiris la tre bongustajn kuketojn kaj Franz tial kopiis la receptojn. Sub paroladoj, kantadoj akompanitaj de Hellmut Grebe per sia gitaro flugis la bela vespero, tiel ke ni estis surprizitaj, kiam la adiaŭa tempo proksimiĝis.

Ni rigardis eksteren pri la vetero — ankoraŭ densa nebulo. Tamen ĉiuj riskis la hejmenvojo. Poste mi aŭdis, ke ĉiuj bonorde atingis siajn hejmojn.

Ni adiaŭis kaj dankis sincere, ke ni povis travivi tiel agrablan, festan vesperon.

Koran dankon, karaj Elisabeth kaj Franz.

Dieter Hartig

Grupvespero la 12-an de januaro 2005

En nia unua grupvespero de la nova jaro 2005 bedaŭrinde nur malmultaj grupanoj povis ĉeesti, entute 6 personoj.

Unue nia kasistino Ruth Bohn raportis pri nova regularo de GEA pri la kotizoj resp. kotizrabatoj. En la venonta jarĉefkunveno ni denove pritraktos tiun temon.

Por paroligi ĉiujn ĉeestantojn ni okupiĝis pri du demandoj:

1. Kio estas bona aŭ malbona en 2004?
2. Kion ni deziras/atendas (aŭ eble timas) por 2005?

Kompreneble la raportoj pri la pasinta jaro estis pli aŭ malpli longaj. Tio dependis de la propraj travivaĵoj. Fine ni konstatis, ke ĉe ĉiuj la pozitivaĵoj abundis kompare kun la negativaj flankoj.

La deziroj estis preskaŭ la samaj ĉe ni ses. Kaj ankaŭ estis samaj aŭ similaj, kiujn ni ĝenerale esprimas, kiam ni sendas bondezirojn por la Novjaro al la familianoj aŭ amikoj.

Sur la pinto de la listo aperis la deziro pri sano. Sekvis kiel alstrebinda celo la paco. – antaŭkondiĉo por evoluo en multaj landoj kaj fundamento de nia propra vivo.

Ankaŭ esprimiĝis la deziro, ke Esperanto malgraŭ la aĝo de siaj anoj ekzistu plu aŭ eĉ disvastiĝu. Laste la sekureco de laborloko(j) ludis rolon en nia pensado pri la nunjara futuro.

Hellmut Grebe



Du muŝoj antaŭ financoficejo. Unu el ili venis el la financoficejo, la alia intencas eniri. La unua diris: “Sensenca afero! Ili suĉas mem.”

ESPERANTO

Ohne Vorurteil und ohne Mauern.
Es wäre so leicht Mensch zu sein.
Ohne Hemmnis.
Ohne Scheu.
Wir müssen keine Helden sein.
Unsere Aussprache ist verschieden.
Doch unsere Sprache ist eins.
Wir alle sprechen Esperanto,
atmen Esperanto,
leben Esperanto,
lieben Esperanto.
Nur im Augenblick liegt die Realität.
Ständiges Kommen.
Ständiges Gehen.
Einzig unvergänglich ist die Ewigkeit.
Und wir sind ein kleiner Stein

Kürsat Celik

Kontribuis Ruth Bohn